FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO
Nº 49a (nova serio)    Nº 134a VINTRO 1979

REDAKTAS : S-ino POTTIER 21 Allée des Roitelets - 76190 YVETOT
Sendu la manuskriptojn antaù la : 10a de Februaro - 10a de Majo
10a de Aùgusto - 1oa de Novembro
Eldonita de : La ESPERANTO-GRUPOJ DE LA RUENA REGIONO
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : CCP. 283 40 H ROUEN
KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 7.00 Fr - Subtenkotizo : ek de 10 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 7.00 Fr.
" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

## K E L K A J   D E Z I R O J . . .

Ĉi momente, kiam mi skribas tiujn liniojn, estas la bondezira periodo, sed kiam ilin vi legos, jam alproksimiĝos la Printempo... Nia bulteno, -pro ne sufiĉe ofta periodeco- ne povas ĉiam enteni freŝajn aktualaĵojn ...

Do, kvankam forpasis la tradicia tempo, mi sincere deziras por ĉiuj feliĉan Novan Jaron .Tion mi deziras al vi por via familia vivo, kaj ankaù por via Esperanta agado .

La bondeziroj de la franca respublikestro, la 1an de Januaro, estis maltrankviligaj : miaj estu iom pli optimismaj .

Oni jam diris ke Esperanto disvolviĝas pli facile en landoj kie vivnivelo estas pli malalta ol nia, ĉar tie, homoj kun malpli da komforto kaj artefaritaj distriloj estas malpli egoismaj, kaj pli favoraj al monda kulturilo kia nia lingvo... Sed, malgraù ĉi supraj linioj, ne kredu ke mi deziras malprogreson de nia vivnivelo por favorigi ESPERANTON, precipe ke la ĉi supra opinio estas senpruva ! ! kaj, ni estas Esperantistoj, ĉu ne ? kaj pro la radiko de tiu vorto, ni ĉiam devas esperi ..

Mi do esperas ankaù ke vi ĉe estos multnombraj nian Jaran Ĝeneralan Kunvenon .Ĝi okazos en la regiono de CAEN .La Samideanoj de tiu urbo klopodas aranĝi agrable tiun renkonton (Vidu la programon en ĉi-tiu bulteno) Tro ofte ni plendas ke " nenio okazas en Suda Normandio " ... Jen pruvo ke ne ! La Grupo en Caen aktivas ; la Grupo enCaen atendas Vin por montri al siaj membroj ke ekzistas Esperantistoj en aliaj partoj de la provinco . Per via ĉe-esto, vi povos estigi ĝojan kaj interesan etoson .Ni pasigos kune pli agrablan semajnofinon ol sidante antaù televidilo .. Des pli ke ni ne povis organizi, decembre, Zamenhof-tagon .La okazoj sin renkonti unuj la aliaj estas do maloftaj : Ne preterpasu tiun okazon !

Ni ankaù ne devas forgesi ke ni estas anoj de granda tutmonda familio. Kiel ni jam diris, nia Unuiĝo estas nur ŝtupo: ni devas grimpi ŝtuparon ĝis Nacia kaj Internacia nivelo. Ni devas partopreni naciajn kaj universalajn kongresojn, aliĝi tutmondajn asociojn kaj aboni internaciajn revuojn .

Ĉiuj Esperantistoj fariĝu aktivuloj por progresigi nian idealon ...

jen miaj deziroj !

Petro Kijo

=====================================

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais -
Le Gérant : P.LEMARCHAND - Dépôt Légal - 4ème Trim. 79

=====================================

## RADIO-ELSENDOJ

| HOROJ | Dim. | Lun. | Mar. | Mer. | Ĵaŭ. | Ven. | Sab. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 04.20/04.30 | | Li.1 | | | | | |
| 06.00/06.30 | Va.1 | Va.1 | Va.1 | Va.1 | Va.1 | Va.1 | Va.1 |
| 06.20/06.30 | | Li.1 | | | | | |
| 06.45/06.55 | Vi.1 | | | | | | |
| 16.30/17.00 | Va.2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 | Va.2 |
| 17.45/17.55 | | | | | | | Vi.2 |
| 19.00/19.10 | | Be. | | | Be. | | Be. |
| 19.20/19.30 | Li.2 | | | | | | |
| 21.00/21.20 | Ro. | | | | | | |
| 21.00/21.30 | Pe. | Pe. | Pe. | Pe. | Pe. | Pe. | Pe. |
| 21.05/21.15 | Vat. | | | | | | |
| 22.30/23.00 | Va3. | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 | Va.3 |
| 23.45/24.00 | | | Za. | | | | |

En la ĉi-supra tabelo, oni trovas la ĉefajn radio-elsendojn en Esperanto, kiujn oni povas okaze kapti en Normandio.

Sur la koincida linio de la horo k. de la tago,vi trovoas kodon. Ĉi sube, klarigo de tiuj kodoj, donas la nomon kaj ondolongon de la Stacio. Ekz./ 19.00/19.10 Be. Lun. signifas ke, je la 19h lunde,vi povas kapti la stacion Berno laŭ la ondoj 48,66 m aŭ 31,46m . (tiu disaŭdigo daŭras ĝis la 19h10 )

BERNO Be = 48,66 - 31,46m

LISBONO Li.1 = 49,79m
Li.2 = 49,79m - 30,80m

PEKINO Pe. = 43,73m - 31,98m

ROMO Ro. = 41,24m - 30,90m - 25,42 -

VARSOVIO Va.1 = 200m - 75,84m - 50,04m - 48,90m - 41,27m
Va.2 = 41,11m - 31,50m
Va.3 = 200m - 75,84m - 50,04 - 49,22m - 41,18m

VATIKANO Vat. = 48,47m - 41,38m - 31,10m - 25,63m

VIENO Vi.1 = 48,74m
Vi.2 = 30,71m

ZAGREBO Za. = 264m

Jen la respektivaj adresoj al kiuj vi skribu viajn komentojn :

Svisa Radio Internacia.Esperanto Fako. CH 3000 BERN 15.Svislando

Radio Difusâo Portuguesa Esperanto,rua do Quelhas,LISBOA 1 Portugalio

Radio Pekino.Esperanto Fako.PEKINO.Popola Respubliko Ĉinio

Radio Roma.Esperanto Fako.Casella Postale 320. I-00100 ROMA.Italio

Pola Radio.Esperanto Redakcio.Poŝtokesto 46.PL 00950 WARSZAWA Pollando

Radiovaticana,Esperanto Fako.Piazza Pia 3 I-00193 ROMA. Italio

ORF.Esperanto,A 1136 WIEN Aŭstrio

Radio Zagreb, Esperanto Fako, ZAGREB Jugoslavio

# KONGRESO

UNUIĜO DE NORMANDAJ ESPERANTISTOJ KAJ FEDERACIO DE U F E

ASNELLES SUR MER (Calvados) 22a kaj 23a de Marto 1980

## PROGRAMO

**Sabato**

14.00 Akcepto de la partoprenantoj

15.00 Ekiro por vizito de Muzeo

19.00 (precize) Komuna kunmanĝado

20.15 Projekciado de Esperantaj filmoj

21.00 Balo ( Vi povas kunporti viajn dancodiskojn )
( Venigu viajn junulojn, eĉ ne esperantistoj)

**Dimanĉo**

07.30/08.30 Matenmanĝo

09.30 Komuna Ĝenerala Kunveno UNE kaj Fed.de UFE

Alparoloj de la Prezidantoj
Agadraportoj de la Grupoj
Financaj raportoj
Elekto de la Komitatanoj
Agadplano 1980/81
Bulteno
Estontaj renkontiĝoj

12.00 Komuna Tagmanĝo

14.00 Marborda promenado

16.30 Adiaŭa Kafo

Pliaj informoj dorse

---

# ALIĜILO

NOMO

Adreso

☐ Mi venos sola = 1 persono

☐ Kun mi venos plenkreskuloj = personoj

☐ Kun mi venos infanoj (sub 15 jaroj) = personoj

Nombro = ☐

Kompletigaj informoj por tranoktantoj :

Mi preferas dulita ĉambro ☐

Mi preferas tranokti en 4-lita ĉambro ☐

Mi venos sola { mi estas viro ☐ / mi estas virino ☐ / aĝo ☐ }

Dorse: rezerviga kalkulo

4

# NIA TUTNORMANDA KONGRESO

DATO : Sabato 22an de Marto kaj Dimanĉo 23an

LOKO : MAISON FAMILIALE DE VACANCES
" Les Tourelles " - ASNELLES SUR MER - Calvados

Bele situita loko tuj apud la strando
Je 4 km oriente de Arromanches , 11 km nordoriente de Bayeux , 25 km nordokcidente de Caen.

KONDIĈOJ Domo kastelaspekta , tre komforta, kies regantaro provizos al ni ĉambrojn,manĝojn, kaj kunvenejojn . La dormoĉambroj,hejtigitaj,enhavas tualetejojn kaj ĉu du, ĉu kvar unupersonajn litojn,tukoj,kovriloj provizitaj .

PREZOJ : Ne altaj,ili estas ankoraŭ pli favoraj kiam oni rezervas la tutan pensionon . Jen por unu persono :

| | |
|---|---|
| Nur unu manĝo , sen tranoktado | 25 F |
| Nur du manĝoj sen tranoktado | 45 F |
| Nur tranoktado, kaj matenmanĝo | 26 F |
| Kompleta pensiono (nokto,matenmanĝo,du manĝoj) | 62 |

Ni devis promesi ke almenaŭ la jenaj ciferoj estos atingitaj :
15 tranoktadoj
40 manĝoj sabaton vespere
30 manĝoj la dimanĉon

Ni antaŭpagis provizon por rezervigi al ni la domon,kaj certigi ke ni atingos tiujn modestajn ciferojn : Vi helpu nin ne aspekti kiel mensogistojn !

ALIĜO : Ĉi-sube,ambaŭflanke troviĝas la Aliĝilo kiun vi bonvolu resendi akurate ,kun via ĉeko banka aŭ poŝta, al
S-ro Henri ROUSSEAU- Parc Viking - 14920 MATHIEU

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## ALIĜILO - Sekvo : Rezerviga Kalkulo

| | | | |
|---|---|---|---|
| Aliĝkotizo (infanoj ne pagas) | 10 F x | | = |
| Libervola subtenkotizo | x | | = |
| Nur vespera manĝo sabate | 25 F x | | = |
| Nur tagmeza manĝo dimanĉe | 25 F x | | = |
| Nur la du manĝoj | 45 F x | | = |
| Nur tranokto kaj matenmanĝo | 26 F x | | = |
| Kompleta pensiono | 62 F x | | = |

Mi kunsendas bank/ aŭ poŝt/ĉekon de . . . . . . . . . =
Je la nomo de Union des Esperantistes de Normandie ==========
C.C.P. ROUEN 283.40 H

Mi sendas al : S-ro Henri ROUSSEAU
Parc Viking
14920 MATHIEU

Subskribo

# VIVO DE LA GRUPO

## CAEN

Reĝkuko Gesinjoroj Angenault invitis siahejme, sabaton la 12an de Januaro, la Esperanto-kursanojn de Caen kaj apudaĵoj, por manĝi Reĝokukegon. Tio estis okazo arigi dudek Samideanojn, kaj paroli pri la baldaŭa Normanda Kongreso .

Malgraŭ la republikaneco de la plimulto (kaj eĉ verŝajne de la tuto), kvar gereĝoj indikitaj de la sorto, estis bonhumore agnoskitaj, kaj kronitaj de la ĉe-estantaro.

( Televido ne raportis ... )

## YVETOT

Generala Kunveno

La ĝenerala kunveno de la Kulturcentro okazis la 30an de Novembro. S-ino Pottier legis la agadraporton de la jaro 1978/79 : du kursoj okazis, kun sep lernantoj el kiuj du trapasis Ateston pri Praktika Lernado : S-ro Evrard (kun cito: Bone) kaj Sinjorino Saklio. Bedaŭrinde, la vivo de la Grupo estis nesufiĉa. La sola manifestacio estis la Reĝkuka Festo .

La Financa raporto de S-ro Saunier montris ke la stato de la kaso estas kontentiga, malgraŭ la aĉeto de bibliotekaj libroj . La kotizo restas je 8 F.

La ĉe-estantaro diskutis diversajn projektojn, el kiuj oni citu la organizadon de Monataj Kunvenoj : la unua okazos la 15an de Decembro.

Fine, post disdonado de premioj, oni reelektis la estraron , kiu estas senŝanga .

Zamenhof-tago

Ĝi okazis la 15an de Decembro. Oni aŭskultis franclingvan sonbendon de radio elsendo pri Dro Zamenhof, disaŭdigita de Radio Luxembourg, en 1961 , en la serio " La vie des Hommes Célèbres " . Diskuto sekvis la aŭskultadon .

Veno de Angloj

En kunaranĝo kun la Grupo de Le Havre, tiu Grupo, kun siaj anglaj invititoj, venos kunmanĝi en la Junuldomo la 27an de Aprilo

**Detala Programo baldaŭ havebla ĉe S-ino Pottier**
21 Allée des Roitelets .

Reĝkuko

La kutime ŝatata reĝkuka Festo okazis la 20an de Januaro. Kun sama plezuro, la membroj povis retroviĝi inter si kaj ankaŭ revidi Samideanojn el la tuta regiono, eĉ el Fecamp, Les Andelys, Le Havre ...

Antaŭ la kvardeko de ĉe-estantoj, S-ro Pottier, levante la glason je la sano de ĉiuj, kore deziris ke tiuj renkontiĝoj okazu ne nur unu fojon jare. Li kaptis la okazon konigi la programon de la estontaj Monataj Kunvenoj :

Marto (Vendredo 7a) : prezento de Gresillon
Aprilo : La Kongreso de la Junuloj en Poitiers (S-ro G.Bettencourt)
Majo : La Kongreso en Varna (F-inoj Domingo)

## LES ANDELYS

La loka gazetaro invitas la infanojn de la urbo partopreni en publika konkurso : " Coiffes et Tetes " kiu okazos la 10 an de Februaro ( Maison des Jeunes, rue Maurice Delarue )

Tiu manifestacio estas organizata de la Esperanto Klubo . Celo: Venigi la infanojn, informi ilin - kaj la gepatrojn - pri Esperanto ! Ruza tekniko , ĉu ne ?

# VIVO DE LA GRUPOJ (sekvo)

## GRAND QUEVILLY

La Kurso gvidata de S-ro P.Quillaud en "Foyer Socio Culturel " daŭras kun kvar lernantoj .

## ROUEN

Deko da personoj regule sekvas la kurson por la Naturamika Grupo de Rouen , en la M.J.C. de tiu urbo

## LE HAVRE

### Vizito de la Soton-anoj

Dum la Generala Kunveno (20.10.79), la ĉe-e tantaro subskribis inviton al siaj "Kolegoj" de Southampton .Tiuj ĉi fervore respondis Ni tiel akceptos ilin la 26an kaj 27an de Aprilo.

Ĉi foje kunaranĝo kun la Grupo de Yvetot permesos allogan programon : Sabato 26 tuta tago kaj vesperaĵo en Le Havre
Dimanĉo 27 kunveturado al Yvetot komuna manĝo
reveno vespere por adiaŭa manĝeto antaŭ enŝipiĝo .

Detala programo baldaŭ havebla ĉe F-ino Sylvie Caron Le Havre
44 rue Gustave Lennier

### Monataj Kunvenoj

16.06 = Silvia parolis pri la "Normandaj Abatejoj" skisante historion de la diversaj ordenoj de Monaĥoj kaj Monaĥinoj .

15.09 = S-ro Laney raportas pri longa vojaĝo sia al Grekio , kaj reveno, aŭtomobile, kun multaj detaloj dum la irado kaj trapaso de pluraj landoj. Vivanta filmo kun multaj bildoj fotitaj el la veturilo mem.

17.11 = "Kiam mi fermos mian pluvombrelon "

Necesis la humuro de S-ro Noël por ataki tiun temon ! Morti estas la tute natura fino de la vivo.Tiam ekaperas panelo: " Haltu! lasu ĉi tie vian pasporton: ĝin vi ne plu bezonas ! ". En la komenco, la korpoj de la mortintoj restis kuŝantaj sur la tero. En postaj epokoj, oni enterigis ilin kaj, rimarkinte ke la sovaĝaj bestoj eltiras la korpojn, oni surkovrigis la teron per ŝtonoj .... Mistiko, kredoj, kaj religioj efikis; kaj tiel estiĝis la kulto al kadavroj. Se ĉiu mortinto posedus sian tombon, la surfaco de la tuta tero ne suficus !

La funebraj kutimoj estis diversaj laŭ la epokoj kaj landoj. Kiom da trompoj okazis -kaj versajne ankoraŭ okazas- pro la neplenumo de la deziroj de la mortontoj ...

Ges-oj Noël testamentis por doni sian korpon al la Medicino; sed evidentiĝas nun ke la abundo de donacintoj iel kaŭzas klopodojn por la ricevantoj, kiuj frontas al konservado-problemoj .

Tial Ges-oj Noël redaktis testamenton por kremacio. " La Tero por la Vivantoj". Post pripenso estas la plej racia solvo por la forirantoj,kiel por la restantoj,kiuj tiel havas malpli da zorgoj .

La katolika Eklezio permesas kremacion de post la Jaro 1963

15.12 = Laŭrenca kaj Silvia raportas kun lumbildoj pri Grekio kaj Kreto, " Antikvaj atestoj pri fama civilizacio " .
( raportaĵo aperos en estonta numero de N E B )

## TESPA ( Théâtre ESpéranto de PAris )

Informas vin pri sia Festo SABATON LA 1an DE MARTO
Centre Jean Verdier 11 rue de Lancry PARIS 10è
(Metroo : République aŭ Jacques Bonsergent )

Ĝi komenciĝos je la 14a horo ĝis la 18a .
Etoso kun muziko skeĉoj,kukoj kaj trinkaĵoj...
..ankaŭ loterumado kun multaj diversaj lotoj !

Venu multnombraj : TESPA atendas Vin !

U . N . E . ASNELLES - Calvados - 1980 VOCDONILO

Ĉi jare, la eliranta triono de la estraro konsistas el
S-ro JOUIS kaj S-ro POTTIER .
Laŭ statute, ili estas reelekteblaj,kaj estas denove kandidatoj
Ĝis nun ni ricevis nenian alian peton pri kandidatiĝo .
Tamen, vi rajtas anstataŭi unu nomon per alia kondiĉe ke la
koncerna persono akceptu esti kandidato .

Estas kandidatoj : S-ro JOUIS
S-ro POTTIER

Se vi ne povus partopreni la kongreson de U.N.E. en Asnelles,
la 2 3an de Marto 1980, bonvolu resendi tiun voĉdonilon al :
S-ro POTTIER , 21 Allée des Roitelets , 76190 YVETOT
antaŭ la 18an de Marto 1980 . Dankon .

---

U . N . E . RAJTIGILO

Se vi ne povas partopreni la Kongreson de U.N.E. en Asnelles
la 23an de Marto, bonvolu resendi tiun rajtigilon al
S-ro POTTIER , 21 Allée des Roitelets , 76190 YVETOT
kun via voĉdonilo .

Dato kaj subskribo

Super la subskribo
Bonvolu skribi permane
" Bon pour pouvoir "

---

N O R M A N D A F E D E R A C I O RAJTIGILO

Mi, subskribinto (nomo)
ne povas ĉe esti la Ĝeneralan Kunvenon de la Normanda Federacio
Mi transdonas mian povon al :
Sinjor(in)o :
kaj petas lin/ŝin agi en mia nomo pri ĉiuj decidoj,kaj pri la
baloto por la elekto de la unua eliranta triono de la estraro.
Dato kaj subskribo

Super la subskribo
Bonvolu permane skribi
" Bon pour pouvoir "

---

VOUS AVEZ PU LIRE , dans ce numero 134 =

- Les Voeux du Président , qui vous invite au Congrès Normand
- Les émissions Radio en Esperanto, captables en Normandie (page 2)
- Congrès Normand : ASNELLES - Calvados - (pages 3 et 4 )
- La Vie des Groupes (pages 5 et 6 )
- Tespa ( page 6)
- Bulletins de Vote et Pouvoirs ( page 7)